

# 110 jaroj de Esperanto en Brno

**La unua Esperanto-klubo fondita sur historia Aŭstria teritorio ne estas en Vieno aŭ alia federacia lando de nuntempa Aŭstrio, sed en Brno kaj en tiu la dua plej granda urbo de Ĉeĥio kaj administra centro de la Sudmoravia regiono okazis maje la festo okaze de ĝia 110-jariĝo.**

**L**a 21-an de majo okazis en Brno solenaĵo omaĝe al jubileo de la plej malnova Esperanto-klubo en Ĉeĥio. La solenaĵon partoprenis 51 personoj, inter ili ankaŭ ĉeestantoj el Aŭstrio. Speciala gasto estis operkantistino Helena Halířová, kiu preparadis por la Brna klubo koncertojn ekde 1958. La programon komencis rememoro pri forpasintoj kaj himno La Espero, poste Miroslav Smyčka kantis kelkajn kantojn sen muzika akompano. La kluba prezidanto Miroslav Malovec koncize priskribis la historion de la klubo kaj la honora prezidanto Zdeněk Hršel alparolis la aŭskultantojn per kelkaj vortoj. Miroslav Hruška prezentis la agadon de la junularo. Post tagmanĝo en proksima restoracio kun la tradicie bonega Brna biero kaj frandaĵoj kiel ekzemple la Ĉeĥaj knedlikoj, Miroslav Malovec daŭrigis la programon per rememoro pri forpasintaj gravuloj de la klubo. Věra Podhradská priskribis la kulturajn programojn postmilitajn (teatraĵojn kaj koncertojn), Pavel Lehký projekciis bildojn kun pruvoj, ke sen

komuna facila lingvo EU ne povas konkurenci al Usono kaj Ĉinio kaj la prelegan posttagmezon finis Jan Werner per rememoro pri kvar neforgeseblaj memoraĵoj. Disponeblis ankaŭ interesaj libroservo kaj ekspozicio. Aliaj klubanoj servis per kafo, limonado kaj kukoj; ĉiu gasto ricevis donaceton, nome belan, modelan turistan faldfolion pri Brno en Esperanto, poŝtkarton kaj kroĉtrikitan papilieton. La solenaĵon gvidis kaj reĝisoris Věra Podhradská.

Impresis la Aŭstriaĵn gastojn la profesieco kaj la afableco de la organizantoj. Estis bele vidi kiel ĉiuj klubanoj kunlaboris harmonie. La gastemo kaj helpemo ne nur koncernis la solenaĵon, sed komencis per konsiloj pri la alveturo kaj finiĝis per akompano al la stacidomo. Restis ne nur belaj impresoj el Brno sed ankaŭ la propono pri kunlaborado de la ĝemelurboj Brno kaj Vieno. Se vi interesiĝas kaj volas kunlabori bonvole vizitu nian retejon [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at) („Internationale Links“, „Städtepartnerschaft“).

**Uwe Stecher**



## Sankta Meso en Graz kun pastro Florian Mayer

**Sabaton, la 6-an de aŭgusto 2011 en la preĝejo de l' Sankta Spirito en Graz (Stirio) d-ro Florian Mayer celebris sian unuan meson en Esperanto.**

**L**i naskiĝis 1982 en Graz kaj studis teologion kaj historion. Junie d-ro Mayer, ankaŭ estrarano de Graz-a Esperanto-societo „Unueco“, ricevis katolikan ordinaron. Partoprenis la posttagmezan meson ne nur Esperantistoj, sed ankaŭ aliaj katolikoj, kiuj forte miris pri tiu ĉi mes-lingvo, tute nekonata al ili (ĉu Hispana dialekto?). Do bona okazo informi, kio estas la Internacia Lingvo. Post la meso okazis gemuta kunveno en la tradicia gastejo de „Unueco“. La restoracio troviĝas ĉe Esperantoplatz, konata Zamenhof-Esperanto-Objekto pro la Jubilea Monumento de Jesper Neergaard kun la vortoj “La Espero - Por Monda Komunikado - En Paco kaj Libero” de Ivo Lapenna (1987); ĉeestis kelkaj gastoj el Kroatio kaj Vieno.

**Uwe Stecher**

